# Kio bojas?

Plaŭ plaŭ plaŭdas la manetoj,
kva kva kvakas la ranetoj,
kla kla klakas cikonio,
kaj boj boj boj bojas kio?




# Kio blekas?

Ga ga gakas la anseroj,
ĉir ĉir ĉirpas la paseroj,
me me la kaprino mekas,
kaj mu mu mu kio blekas?



## Kio ĝi estas?

El felo la vesto,
la vosto - peniko,
al tiu ĉi besto
tre gustas brasiko



## Kukolo

Kukolo kukolas,
kiun trovi volas?
Eble gnomojn pitajn
en fungoj kaŝitajn?

